

BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara esperantista asocio

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 1 svisa franko, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.
Adreso: Poŝkesto 233, SOFIA (Sredec), Bulgarujo.

Jaro XVI

Marto-Aprilo 1935

№ 7-8

PRINTEMPO



Foto Papakočev

Bulgara vilaĝano

Patrujo — homaro

„Ho, patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon algluiĝi per sia tuta koro al tiu peco da tero, kiu lin naskis!“

L. L. Zamenhof, 1907.

La 3-a de Marto (19-a de Februaro, laŭ malnova stilo) estas unu el la plej grandaj festoj por la bulgara nacio. En tiu tago, antaŭ 57 jaroj, okazis ĝia liberigo de kvincentjara duobla, mal-luma jugo. Teruraj estis la penoj de la sklaveco kaj senfinaj la viktimoj de la libereco. Falis fine, post sangoplenaj bataloj en 1877—1878, la nigra kurteno kaj kreiĝis la t. n. Sankt-Stefana Bulgarujo. Sed ne ĉesis la suferoj de la bulgara popolo, sopiranta liberan vivon kaj disvolvon. Disŝiris ĝian korpon la postkulisaj ludoj de la eŭropa diplomatio. La granda bulgara patrujo estis dividita, malgraŭ gloraj venkoj sur la kultura kaj batala kampoj.

Trompita en siaj liberecaj klopodoj de grandaj kaj malgrandaj nacioj, la bulgara popolo ne perdas la amon al sia patrujo, ĝi laboras kaj vivas kun la espero, ke fine venkos la vero kaj realiĝos ĝia justa revo — atingi sian idealon: la nacian unuiĝon, por kiu ĝi batalas 12 jarcentojn, por kiu ĝi partoprenis ankaŭ en la lasta tutmonda milito. Neuilly — tiu nigra makulo de la XX-a jarcento, tiu barbara „pactraktato“ — prokrastis la aferon de la bulgara unuiĝo, sed ne povis ĝin neniigi. En la korpo de ĉiu bulgaro — kie ajn li estas — vivas la idealo de la **Celokupna Bâlgaria** — Unuigita Bulgarujo, — ĝi estas la gvidstelo de la junularo kaj okcidenta Eŭropo devas kompreni, ke ne estingiĝas tio, kio ne estas estingebbla. Juĝitaj kaj kondamnitaj sen allaso, sen defendo, kelkaj popoloj de nia kontinento estis devigitaj sub ordono de la „venkintoj“ subskribi sian mortsentencon, sed la popoloj facile ne mortas, la kondamnitaj „venkitoj“ ankaŭ volas vivi.

La bulgara nacio, kiu jam en frua pasinteco, kiam la grandaj okcidentaj popoloj ne sciis legi, havis propran al-

fabeton kaj literaturon, kiujn kun la kristana kulturo ĝi transdonis al la slavo, samkiel la ideojn de la libereco, egaleco kaj frateco al la francoj, kaj kiu donis tiom da karaj viktimoj sur la altaro de la libereco, ne forgesas siajn sklavigitajn infanojn kaj ne trankviliĝos ĝis ili ne estos liberigitaj kaj unuigitaj.

La bulgara spirito, kvankam momente subpremita, estas potenca, kaj kiam super la bulgara Golgoto fine ekbrilos la suno de la libereco, tiam estiĝos la alsopirata epoko de amo, paco kaj frateco. Sen kontentaj nacioj ne estas feliĉa internacio, samkiel sen apartaj unuoj ne ekzistas grupoj. Nur unuigitaj popoloj en siaj etnografiaj landlimoj povas formi unuigitan homaron. For la maljustaĵojn, indulgu la homojn, donu fortan pacon al la homaro, sen venkintoj kaj venkitoj, revenante al la principoj de Wilson, se vi volas pacon. La paco estas sankta, ne la traktatoj. La historio pravas, ke *neniu* pactraktato estas eterna. La Pariza diktaĵo post la tutmonda hombuĉado eĉ ne estas pactraktato kaj ĝi mem ruiniĝas! Tial ĉies devo estas akceli la veran pacon per amika *revizio*, per kompromiso, per reciprokaj cedo, sen sangverŝado, kiel estas antaŭvidite ankaŭ en la kontrakto de la Ligo de Nacioj. La plej bona fortikaĵo inter la popoloj estas ilia amikeco. Savu la homaron!

La homaro, tio ja estas la oceano, en kiun eniras ĉiuj patrujoj — riveretoj, riveroj, maroj. Patrujo kaj homaro jam estas unu kaj sama. Multaj grandspiritoj kiel Hugo, Zamenhof, Forel, Roland, Briand, Kalergi k. a. laboris por spirita altiĝo kaj unuiĝo de la popoloj. La nova tago jam alvenas. Sed la malnova devas esti finvivita. La popoloj ne plu estas mallarĝe fermitaj en siaj landlimoj. Kiam unu popolo malsanas, malsanas ĉiuj. La financoj, la ekonomio kaj la kultura vivo estas jam komunaj. Oni devas evolui. La proceso estas doloriga. La problemoj estas malfacile solveblaj. Tial oni devas labori, skribi, paroli. Fariĝi internaciisto. Preni en sia mano la defendon de la popolamasoj.

La plej bela, la plej potenca kaj la plej morala sento, propra al la homa naturo, estas la amo al la patrujo. La Providenco metis en la animo de la homo la sindonon al la gepatra tero. Tiu ĉi amo al la patrujo, al la gepatra tero, al la naskiĝa tegmento estas liberiginta la sklavigitajn popolojn aŭ partojn de ili por serĉi sian liberiĝon. La historio parolas al ni pri tio tiel bele, ke ne necesas plu paroli. La amo al la „patrujo“ ne esceptas la amon al la „homaro“. La unu ja estas parto de la alia. La dua ne povas ekzisti sen la unua. Tute kontraŭe. Kaj nome pro amo al la patrujo ni devas fariĝi internaciistoj. Ni

penetru nin per la doloroj kaj penoj de la aliaj popoloj, unue per tiuj de niaj najbaroj, por ordigi ankaŭ la niajn, por ekvivi en paco. Ni devas solvi la problemojn laŭ paca maniero, celante la **revizio, arbitracio kaj malarmigo**. Ili estas por ĉiuj, ili portas la pacon.

„Patrujo kaj homaro“. Kiel malfacila estas la proceso de la renovigo. Sed ĝi devas solviĝi. For la militon! Malamiko ekstere ne ekzistas. Ni devas venki nin, ĉar la malamiko estas en ni mem, por venki ĉion kaj estigi la regnon de Dio.

Srednogorski

Една отъ най-голѣмитѣ мжнотии въ живота е различието на езицитѣ.

Волтеръ

Днесъ единъ единственъ международенъ езикъ е необходимъ за човѣчеството по-вече отъ когато и да е по преди. Може ли да се отрече, че такъвъ езикъ ще даде силенъ тласкъ на прѣсеса на културния развой?

Максимъ Горки.

Prefigu vin

por la XXII-a Espesantista kongreso en Varna —

la reĝino de Nigra maro — la somera ĉefurbo de Bulgarujo,

la Riviero de la Balkanoj



Membroj de societo „Radio“ en Pazarĝik kun la sekretario de B. E. A., fotografitaj antaŭ teatro „Videlina“ post lia publika parolado.



P. G. Pamporov

Printempo

Alvenas jam printempo
— Beleco, vivo, suno,
Alvenas nova tempo
De amo, ĝojo, lumo.

En frumatenoj helaj
La ora sun' leviĝas
En la animoj belaj,
Sunrevoj revekiĝas.

Elkreskas freŝaj floroj
— Ridetoj de l'anĝeloj,
Ektremas jam la koroj
— Fontetoj de l'ĉieloj.

Al amo, saĝo, vero
Nin vokas nova suno,
Al ĝojo, viv', libero,
Ni flugas per la lumo.

Stel (Dijon)

Ĉar amas

En lumo printempa, vi, birdo kantanta,
Ĉu ĝoja vi estas?

— Senzorga, mi kantas al viv' vekiĝanta:
Mi ĝojas, ĉar amas.

En nokto malhela, steleto brilanta,
Ĉu ĝoja vi estas?

— Zorgante la dormon de sun' varmiganta:
Mi ĝojas, ĉar amas.

Tra l'spaco'senlima, venteto fluganta,
Ĉu ĝoja vi estas?

— Senĉese min vokas vastec' alloganta:
Mi ĝojas, ĉar amas.

En mondo ĝojplena, vi, homo vivanta,
Ĉu ĝoja vi estas?

— Serĉante feliĉon, estulo vaganta,
Mi ploras, ĉar amas.

Dimitar Babev

Kanto de miaj kantoj

Pasadas — kvazaŭ sonĝe — karavan'
de l'temp': rajdistoj bravaj, sklavoĵoj nigraj,
kun krucoj kaj standardoj en la man',
kun ĝojo aŭ amaro — ili migras
la vojon de la sorto kaj misteroj,
solvataj, nekonataj por eterne.

Pasadas — sur ikonoj el arĝent'
sanktuloj kvazaŭ, aŭ jen kun tempestoj
bruanta mar' sub la freneza vent' —
kun furiozo kaj minacaj gestoj.
Kaj tiam sub la peza, ŝtala paŝo
nek arb', nek kampo donas la riĉaĵojn.

Kaj kiel karnavalo: tromp' kaj hont',
kun bru' trumpeta kaj tambura trenas
sin de l'freneza viv' la danca rond',
volvata de venenaj serpentenoj.
La amo sole . . . sed ĝi same mortas
de la diablo sub la nigra forto.

Pasadas — kvazaŭ sonĝe — karavan',
de l'temp': flugiloj blankaj sangkoloraj, —
kiel monaĥoj for de l'tera vant',
kiel rajdantoj sur la seloj oraj.
Kaj en la marŝ' kapturna sur la tero —
ho vlv' aspektas strange vi fieraj!

Duboj

„Mi ne demandas vin: kio mi estos?
Mi volas, ke vi diru: kio mi estas,
kaj pro kio mi vivas.“ Petöfi

Jes, kredu, ho amiko: eĉ se la ĉagreno
nur foje vundus nin — disŝirus la kurtenon
de la vivad'! Kaj kion flegis nia am':
esperoj, revoj kaj bataloj — ĉio jam
forflugas — kiel la memoro pri fabelo.
Kaj en la viv' ni reekserĉas kredon helan,
pli vastajn horizontojn de la vivbatal',
instigojn al la pli alta, senca ideal'! —
Sed fine tudas la mizera vivprogramo,
de praepoko eĉ ĝis nun la bildo sama —
kies pentristo estas nova nur person'.
Eterne de hieraŭ sama la reson'! . . .
Kaj... duboj premas la animon, ĝi ribelas, —
kaj ŝajnas ĉiutaga viv' sintromp' malbela.

El la „Nova Antologio“
de I. H. K.

La printempo

Milde kaj varme estas ekstere. Avino Marto*) alvenis.

Infanoj de la kvartalo ni ariĝis por ludi sur la placo apud nia domo. Ni ĝojas pri la bela suno. Agrable estas al ni, ke estas varme. Kaj ĝoje ni kuras, persekutas nin.

Subite iu el la infanoj haltas kaj fiksas la rigardon ien en la altaĵon. — Jen vidu, vidu! — kaj li montras per fingro. Ni ĉiuj haltas kaj rigardas, kien li montras. El la monteto, alte sur la ĉielo, flugas ia birdo kun larĝe etenditaj flugiloj. Jen post ĝi ankoraŭ unu. Ni enrigardiĝas kun malpacienca atendo. La birdoj jam flugas pli malalten. Ili fariĝas pli grandaj. Kaj ni rimarkas ion blanketan sur ili — Estas cikonoj! — krias iu. — Cikonoj!... — Ni eksaltas pro ĝojo kaj plaŭdas per la manoj. Ili flugas jam ĝuste super ni. — Cikonio-nio, ĉu vi vidis mian patron? Cikonio-nio, ĉu vi vidis mian patron?... — ni ekkrias tiel laŭte, kvazaŭ ni volas, ke ili aŭdu nin. Sed el ĉiuj plej laŭte krias Koto Vasjovĉin. Kaj tuj: — Mi vidis lin, mi vidis... — aŭdigas sin per ŝanĝita voĉo iu el la pli grandaj infanoj. — Kion faris mia patro? — ĉiam tiel laŭte daŭras Koto. — Sian kalsonon li lavis... — respondas la alia kun la ŝanĝita voĉo. Eĥas gaja rido.

Kaj la cikonoj, flugante iom super ni, kvazaŭ por aŭdi, kion ni demandas kaj por respondi al ni, forflugas pluen kaj perdiĝas.

Ni deŭrigas la ludon. Nur Koto staras iel kadukiĝinta... Kial do?... Mi konjektas. — Lia patro ne estas tie-ĉi. En fremdlando estas li, ie tre malproksime. Kaj la cikonoj estas vidintaj lin... Ili ja venas de tre malproksime, tial...

De tre malproksime venas ili... Kaj kiajn ja mirindajn lokojn ili traflugis! Kiom da mirindaĵoj ili vidis!... Kaj mi transportas min en pensojn pri tiuj malproksimaj lokoj, pri tiu nekonata mondo, kie estas la patroj, kiam ili iras vivgajni kaj de kie printempe venas la cikonoj...

Tr. I. H. K.

*) Tiel la popolo nomas monaton Marton R. de la tr.



T. G. Vlajkov

Todor G. Vlajkov

La 14. aprilo n. j. kultura Bulgarujo festis la 50-jaran literaturan agadon de la 70-jara beletristo T. G. Vlajkov-Veselin, naskiĝinta en Pirdop. Tiuokaze la Ministerio de publika instruado eldonis kaj la Ŝtata presejo senpage presigis la unuan volumon de liaj *Travivaĵoj — Infanaj jaroj*. Tiu-ĉi libro prezentas novan literaturan specon ĉe ni, kiel en la fremdlanda literaturo estas ekz. la „Poezio kaj vero“ de Goethe, „Infaneco“ de Gorki k. a. Ĝi havas grandajn kultur-historiajn kaj literaturajn indecojn, kiel unua provo prezenti nian personan kaj socialan realecon tra la prismo de personaj travivaĵoj.

Gratulante la faman jubileanton, el sub kies plumo aperis deko da dikaj volumoj pri plej diversaj temoj, ni donas ĉi-tie malgrandan eltiraĵon el ĉapitro XX de la supremenciita verko.

Гответе се за XXII Есперантски конгресъ
въ Варна — царицата на Черно море —
лѣтната столица на България — Ривие-
рата на Балканитѣ.

La vilaĝano

Post la morto de sia patro, li heredis la domon kaj la bienon. Se ne estus la milito, li ne vidus la mondon, kaj konus nur sian naskvilaĝon kaj la urbon, kie li vendis kaj militservis.

Juna ankoraŭ li iris militon, pasigis la tutan tempon sur la fronto, estis vundita dufoje kaj post la militfino revenis tuj en sian vilaĝon. Pri la milito li ne ŝatis paroli, dum la aliaj parolis, plej ofte tiuj, kiuj ne militis aŭ estis malantaŭ la fronto, li aŭskultis kaj nur subridetis.

Lia frato estis mortigita en la milito, lia fratino edziniĝis en la najbara vilaĝo, kaj li estis devigita serĉi helpon. Tial li edziĝis. Lia tero ne estas multa, sed li zorgas pri ĝi kaj ĝin bone prilaboras. Li havas du bovinojn kaj kelkajn ŝafojn. En mezaj jaroj lia memproduktata greno apenaŭ sufiĉas por semado kaj por nutrado, en bonaj jaroj restas malmulto ankaŭ por vendo. Monon li enspezas dum la jaro nur post vendo de lakto, de kelkaj kokinoj kaj malmultaj ovoj. Sed tiuj-ĉi enspezoj por nenio sufiĉas, tial lia edzino mem teksas ŝtofojn kaj kudras vestojn, kaj li riparas sian bovoveturilon kaj siajn ledsandalojn. Se li volas aĉeti pli da tero, li devas pruntepreni monon ĉe la procentegisto aŭ de la banko, kaj ĉi tio lin timigas.

P. Dánov

Fabelo pri la reĝaj filinoj

Iam vivis riĉa kaj povoplena reĝo. Tamen mankis io, por ke lia reĝeco estu feliĉa: li ne havis filon, kiu devis supreniri a tronon kaj daŭrigi la dinastion. Li havis du filinojn. Ĉiuj provoj ricevi ankaŭ filon malsukcesis. Eble la malfeliĉo ne estus tiel granda, se la filinoj posedus ĉiujn homajn kvalitojn. Ili edziniĝus, iu el ili havus filon kaj jen la solvo de la problemo.

Bedaŭrinde la anĝele bonkora unua filino estis malbela kiel birdotimigilo. La anĝele bela dua filino estis malbona, kolera, furioza kiel demono.

Neniu el la konataj princoj sur la

Li laboras la tutan jaron. Lin helpas la edzino kaj la infano. Je rikoltado kaj draŝado sin helpas reciproke najbaroj kaj parencoj. Dum la vintro, kiam sur la kampo ne eblas labori, li veturigas lignon el la arbaro, plektas korbojn aŭ matojn, kaj en la drinkejon li deiras tiam pli ofte.

Lia infano vizitas lernejon. Post la fino de la lernjaro, ĝi revenas kaj helpas lin, lernas lian metion, por lin anstataŭi, kiam li maljuniĝas aŭ mortas kaj por ke ĝi ankaŭ daŭrigu sian vivon ree kiel vera vilaĝano.

Verdostelin

Ĉu vi scias?

Ĉu vi scias, kio estas la koro de l' poeto, infano? Ĝi estas kiel perla mitulo. Kaj la suferoj, kiuj eniras en ĝi, estas la sableroj, kiuj poste transformiĝas en perloj.

Kaj ju pli grandaj estas la suferoj, despli ĝojas la okuloj de la homoj je la neordinare grandaj perloj: — kantoj, fabeloj kaj rakontoj.

Ankaŭ ili, la homoj, kiuj sin ornamas per la perloj de la mitulo, ne konas ĝian suferon, ĝis kiam ĝi transformas la sableron en perlon. Tiel same ili ne konas la suferojn kaj turmentojn de tiu, kiu transformas siajn suferojn en ĝojojn por la aliaj.

Benitta

tero, dignaj fariĝi reĝaj bofiloj, kuraĝis postuli la manon de iu ajn el la du reĝaj filinoj.

La tempo pasadis, la reĝa problemo fariĝis pli kaj pli komplikata per la progresanta maljuniĝo de la filinoj. Pro senĉesa pensado la reĝo perdis apetiton kaj sonĝon. Tamen la reĝa bofilo ne estis videbla sur la horizonto.

Turmentita pro senfruktodona pensado, la reĝo kolektis siajn plej saĝajn virojn kaj postulis konsilon.

Inter la konsilantoj estis unu efektiva saĝulo. Li proponis la jenon:

— Reĝo mia, li diris, la problemo

povas esti decidota nur de Dio, laŭ vojo de la destino. Ni konstruu turistan dometon en la Balkano, kaj la unuajn du alvenintajn junulojn, kiujn ni akceptu kiel senditajn de Dio, ni faru edzoj de viaj filinoj.

La reĝo akceptis ĝoje ĉi proponon, esperante, ke la bona Dio sendos al li efektive bonajn princojn, kiuj digne kaj sukcese akceptus la respondecon de la tronheredontoj. Kaj ili ekatendis senpacience.

Efektive, la reĝo ne estis devigata multe atendi. Dum montara uragano du junuloj ekserĉis la tegmenton de la reĝa dometo. Kun malfermitaj brakoj akceptis la reĝo siajn du bofilojn. Sed jen—neniu el ili estis princo. Tiuj estis ordinaraĵoj ekskursemaj junuloj, eĉ ne anoj de iu turista asocio. Ankaŭ tio ne sufĉis: unu el ili estis blinda kaj la dua surda kaj muta.

Kion fari? Oni devis obei al la decido de la sorto.

La reĝo denove demandis la saĝan maljunulon: Kion oni devus fari?

— Nenio pli facila, respondis la saĝulo. Edzigu la blindan junulon kun la malbela kaj la surdan kun la kolerema filino.

Bonega decido okazis! La reĝo eĉ ne atendis tian feliĉan solvon de la problemo! La blindulo tuj ekŝatis la bonan animon de sia bonkora edzino. Li aŭskultis ŝiajn vortojn, ĝuis ŝiajn bonajn zorgojn kaj, ne vidante ŝian malbelecon, sentis sin kvazaŭ en paradizo.

Ne estis malfeliĉa ankaŭ la dua reĝa bofilo. Li ĝuis anĝelan belecon de sia edzino kaj tutkore dankis Dion pro la ĉiela donaco. Eĉ kiam ŝi paroladis plej malbonajn vortojn, kiam ŝi nomis lin per la plej florantaj epitetoj, kiel „azeno“, „hundo“ kaj aliaj similaj vortoj, ne mankantaj en ŝia vortaro, li pensis:

— Kiajn ĉielajn vortojn devas prononci ĉi bela anĝela buŝo! Kian saĝecon devas enteni ĉi bela kaliko de Dio! Kial mi ne povas aŭskulti ŝin nur unu fojon malmulte, kaj poste — mi mortu!

Ĝio iris bonege, la reĝa plano pri la daŭrigo de la dinastio kvazaŭ plenumiĝis paŝo post paŝo, se... nun la ĉiam malkontenta homa naturo ne enmiksiĝis. La bofiloj de la reĝo komencis fariĝi malgajaj. La unua ekdeziris nepre vidi la imagite belan vizaĝon de sia tiel bonkora, anĝelanima edzino, kies voĉon kaj dolĉajn vortojn li ĝuis, kaj la dua ekdeziris nepre aŭskulti la voĉon kaj la vortojn de sia anĝele bela vivkamaradino.

La reĝo alvokis la saĝulon, priskribis la situacion kaj demandis lin pri konsilo.

La saĝulo kuntiris la frunton.

— Mi petas, via reĝa moŝto, ke ni ne tuŝu per homaj deziroj la Dian planon! Se Li malfermus la okulojn de la blindulo, se Li donus aŭdon kaj parolon al la surdmutulo, tiam la tuta feliĉo en via domo por ĉiam estus forpelota.

Tiel diris la saĝulo. La reĝo pripensis kaj konsentis, ke li estas tute prava, ĉar Dio ne donas ĉion al la neniam kontentigeblaj homoj; kaj ĉar iluzio mem estas nepra kondiĉo por ilia feliĉo.

Nun, miaj karaj aŭskultantoj, kian praktikan utilon vi povas ricevi el ĉi malnova fabelo?

Jen ĝi. Se via edzino estas bonanima, bonkora, sincera, se ŝi prizorgas vin atente, amoplene, vi fariĝu blinda pri ŝia malbeleco.

Kaj se ŝi estas malbonhumora, kolera, furioza, se ŝi supersutas vin per florantaj epitetoj, pruntitaj el la vortaro de la dua reĝa filino, vi klopodu fariĝi surda kaj muta, ĝuu ŝian belecon kaj danku al Dio pro la iluzio, kiu ebligas, malgraŭ ĉio, la homan feliĉon sur la tero.

Esperantigis: *D-ro St. Kadiev.*

Per-esperanta propagando pri Bulgarujo

Pola Esperantisto en sia februara numero publikigis artikolon „Pola-bulgara amikeco“, trad. el „Mir“ de nia redaktoro s-ro Krestanov.

F-ino Tesla Flint, ĉefredaktorino de „Isosek“, en Nederlando, tradukis holande

la literatur-sciencan etudon „En la lando de la rozoj“ de s-ro Krestanov kaj publikigis ĝin kun ilustraĵoj en tiea revuo.

Nia ĥina samideano s-ro Kinkemo tradukis ĥine du novelojn de Stamatov laŭ la esp. traduko de s-ro Krestanov kaj aperigis ilin en aparta libreto.

Iv. H. Krestanov

Fragmentoj el
„Tra Eŭropo per Esperanto“

II.

En la lando de la sportoj kaj kutimoj

Jam delonge mi deziris viziti la landon de la britoj, pri kiuj oni ofte aŭdas kaj legas strangaĵojn sur la kontinento. Tial kun granda plezuro mi — estante ree en Parizo 1928 — akceptis la afablan inviton de la Angla Sudmezlanda Esp. Federacio.

Malgraŭ la oficialaj rekomendoj pri mi, longe mi devis atendi en Boulogne sur Mer kaj Calais la anglan enirvizon. Ricevinte ĝin, mi enŝipiĝis kaj tra „La Manche“ jen mi en Dover. Ĝiaj blankaj rokoj, videblaj de malproksime, klarigas al mi la poetan nomon Albiono. Kaskitaj policanoj kun blankaj manikoj montras al mi, ke tie ĉi regas ordo. Mi pasas en la doganejon. Al mia franclingva klarigo, ke mi estas bulgara esperantisto kaj ĵurnalisto, angla oficisto, ne tuŝante mian valizon, nur respondis: „All right!“ Tia konfido! Mi libere antaŭeniras kaj serĉas triaklasan vagonon al Londono. Jen ĝi! Mi eniras, sed mi dubas, ĉu mi bone legis. Tia lukso kaj oportuno ne ekzistas eĉ en unuaklasa vagono bulgara, nek en duaklasa franca. Ni ekveturas. Nenia balancado. Tiajn glatajn vojojn mi nenie vidis en la okcidenteŭropaj landoj.

Estas komenco de Septembro. La somero kvazaŭ sendas sian lastan kison per varmaj sunradioj. Ekstere estas ankoraŭ tiel verde, freŝe, hele. La densaj mallumoj kaj frostaj nebuloj ekzistas verŝajne nur en la kapoj de tiuj, kiuj ne vizitis la landon de John Bull.

Interne en la koro kaj animo belaj sentoj vin karesas. Vi instinkte volas dividi la impresojn. En mia kupeo sidas tri tipaj angloj kaj unu anglino kun knabineto. Iu legas ĵurnalon, dua revas, tria fumas. Ĉiuj silentas. Prave diris iu, ke anglo povas veturi de Londono ĝis Edinburgo ne parolante. Tio ĉi en Bulgarujo ne estas kutimo kaj mi sentime rompas la silenton: „Do you speak French?“ — „No!“ „Do you speak German?“ — „No, only English!“ Mi turnas min al la sinjorino: „Do you speak

Esperanto?“ — „What is that?“ ŝi demandas min siavice kaj sekvas ankoraŭ kelkaj vortoj, kiujn mi tute ne povas kompreni. Ĉar se demandon mi iom scipovas fari, respondon mi nenion sukcesas kompreni en tiu terura miksaĵo de franca kaj germana, kia estas la angla buŝrompilo. Prave diris bulgara verkisto Aleko Konstantinov, ke la angloj skribas „gutaperĉa“ kaj prononcas „kauĉuk“ ... Dank' al tiu malfacila prononcado ilia lingvo neniam fariĝos universala, kaj mi venas al mia fincelo: interesigi pri Bulgarujo kaj Esperanto.

Impresis min la fakto, ke dum ni bulgaroj multon scias pri la lando de Shakespeare, Dickens, Byron, Gladston, Burchier, fratoj Buxton ktp., la angloj scias nenion pri la lando de la rozoj, kiun kelkaj eĉ intermiksas kun... Hungarujo... Nur mia mencio de Nigra maro iom donas al ili la ideon pri ĝia situo.

En Londono mi alvenas sabaton malfrue. Serĉi esprantistojn ĉe Brita Esp. Asocio estus tempo perdita. Kaj tempon kiel monon mi devas ŝpari. Tial mi kuraĝe paŝas antaŭen, kun firma kredo, ke la kuraĝulojn helpas sorto aŭ hazardo. Dio mia! Kia funkciado, svarmado, veturiloj, popolamaso, maro da plej diversaj moviloj naturaj kaj artefaritaj. Oni preskaŭ perdiĝus en tiu monstra urbego. Sed jen policano afable montras al mi la vojon, alia helpas min aĉeti bileton por subtera vagonaro, kaj france-germane „parolantaj“ angloj, rimarkinte mian embarason, akompanas min ĝis la vagonaro al Luton...

— — — — —

Ne, tiun Anglujon mi ne konis; ĝi estas lando varma kun koro ĉarma! Kaj mi nevole rememoras ke, dum la granda mondbuĉado, germanoj parolis, ke ekzistas du specoj de dupieduloj: homoj kaj... angloj. Kaj la tiel parolintaj germanoj ŝajnas pravaj — ne homoj, sed superhomoj estas iliaj transmaraj kuzoj!

— — — — —

Nun, post Luton viciĝas Northampton, Welwyn Garden City, Birmingham, Coventry, Bourneville, Cheltenham, Whiteway, Bristol, Bath, Southport, Manchester, Liverpool, Birkenhead, Sheffield k. a. Ju pli norden mi veturis des pli bonan esperanton mi aŭdis kaj dolĉajn kantojn aŭskultis. . .

— — — — —

En Northampton, la centro de la leda industrio, mi renkontis ĉeĥoslovakajn kaj japanajn samideanojn. Ni triope direktiĝas al la „Town-Halle“. Tio ĉi estas la urbdomo, fama pro siaj skulptaĵoj kaj pentraĵoj, montrantaj la tutan historion de Anglujo. La vojon montras al ni du belaj knabinoj, kiujn mi havis la kuraĝon alparoli en mia angla lingvo. Ili eĉ iomete akompanis nin — la interesan trion. En la longaj koridoroj, observante la pentraĵojn, mi diris al miaj samideanoj: „Ha, se nun la urbestro bonvolus inviti nin!“ Dirinte tion, mi sentis fremdan manon sur mia ŝultro. Mi turnas min. Alta sinjoro kun grizaj haroj kaj barbeto tiras min al ĉambro . . . Miaj kamaradoj ektimis kaj iom malproksimiĝis. Mi troviĝis en luksa ĉambrego. La nekonata sinjoro stariĝis antaŭ skribtablo, elskatoligis ian cran ĉenon kaj klarigis al mi angle, ke ĝi estas de la tempo de reĝino Victoria — „Sed kiu vi estas?“ mi demandis mirigite. „Mi estas la urbestro!“ respondis li angle. Mi tuj kuris al la pordo, vokis miajn kamaradojn kaj prezentis ilin al la urbestro, s-ro Joseph Rogers. Tiu ĉi tre ĝojis pro nia vizito, sidigis nin kaj proponis al ni elegantajn cigaredojn. Poste li mem gvidis nin tra la tuta urbestrejo, montris ĉiujn vidindaĵojn — interalie la naturgrandan bildon de la patro de Georg Washington, naskita ĉi tie — kaj donacis al ĉiu po unu albumeto kun sia subskribo. Fine li vokis ĵurnalistojn, fotografis sin kun ni, prezentis nin al altrangaj magistratoj k. a. La saman vesperon ĉiuj lokaj gazetoj parolis pri nia vizito al la urbestro, pri la favora rilato al nia afero, pri la vera societo de nacioj, kiun ni formis, nomante esperanton mondpacigilo kaj aperiginte niajn fotojn. . . Ni estis je granda honoro. . .

— — — — —

En Liverpool mi faris tri paroladojn en la sama tago. Antaŭtagmeze en germana pri la „Bulgara lernejo“, posttagmeze en franca pri la „Pacmovado en Oriento“ kaj vespere en esperanto pri la „Bulgara lando kaj popolo“. Post la bankedo oni volis min. . . dividi je tri: invitis min samtempe ges-roj. Aplebaum, ges-roj univ. prof. Collinson kaj generalo Kiften Taylor. Tiom da afableco!

— — — — —

La plej grandan kaj neforgeseblan afablecon mi tamen ĝuis en la personeco de mia malnova angla korespondanto, s-ro H. W. Southcombe en Kingston on Thames. Li konatigis min kun sia familio, gastigis min en sia kastelo, montris al mi diversajn pribulgarajn librojn en sia riĉa biblioteko kaj gvidis min dum kelkaj tagoj al diversaj malnovaj kaj novaj monaĥejoj, palacoj, muzeoj ktp., ŝparante nek tempon, nek monon por vidigi, klarigi, amigi al mi Anglujon.

— — — — —

Nur dudekkvinon da urboj kaj urbejoj en la suda kaj norda partoj mi vizitis. Nur modestajn babiladojn pri la lando de la freŝa aero kaj rozoleo mi faris. Sed mi vidis, aŭdis kaj rikoltis tiom da belajĵoj dum mia kelkmonata restado en la lando de la sportoj kaj kutimoj, ke la longa filmo en mia kapo bezonus multan tempon por riveli ĉiujn impresojn. Neforgeseblaj estas la tagoj pasigitaj en la frata medio de la anglaj gesamideanoj. Ĉiu el ili — de la laboristo ĝis la komercisto kaj de la instruisto ĝis la profesoro aŭ de la urbestro ĝis la generalo — kvazaŭ vetkuris kaj konkuris por montri al mi sian afablecon, amon, scivolemon.

Ne unufoje mi transiris la sojlon de la angla „kastelo“ kaj troviĝis kvazaŭ en propra hejmo. Tian gastemon mi ĝuis nenie sur la kontinento dum mia 30-jara esp. vivo. Kvazaŭ la angla koro estas pli granda ol la korpo. Francoj, germanoj kaj slavoĵoj havas ankoraŭ multon por lerni de tiuj ĉarmaj insulanoj. . . Ĉe ili ankaŭ la movado de la Verda Stelo estas imitinda modelo!

Nia vivo

Sofia. Nia blinda samideano, la granda komponisto Imre Ungar, laŭreato de la Ŝopen-premio, denove vizitis la bulgaran ĉefurbon kaj rikoltis tondrajn aplaŭdojn en la du donitaj koncertoj.

— Nia fervora samideano, la fama kupledisto Stojan Milenkov, festos dum tiu ĉi monato sian 25-jaran kulturagadon. Ni deziras al li ankoraŭ longan vivon kaj baldaŭan efektivigon de la intencata „Verda kabaredo“.

— La konata bulgara virtuoza de „miela kavalo“, s-ro Georgi Keĥajov, antaŭ kies sonoj eĉ la ranoj ĉesas kvaki kaj la lupoj haltas, eklernas esperanton. Li jam vizitis preskaŭ ĉiujn eŭropajn ĉefurbojn kaj nun pretiĝas por Ameriko. Ni esperas, ke ankaŭ tie liaj koncertoj estos amase vizitotaj kaj ke la bulgara popolkanto kaj muziko gajnos al ni novajn amikojn.

— La 20. Marto en la salono de legejo „Hr. Botjov“ okazis publika kunveno kun paroladoj de s-roj P. Jordanov kaj B. Oktomvrijski.

— La 23. Marto la Sofia esp. societo kune kun la Sporta turista klubo „Esperanto“ organizis en plenplena salono de kino „Ufa“ literatur-muzikan vesperfeston. Nia samideano St. Milenkov diris kelkajn humoraĵojn, post kio sekvis aliaj bone plenumitaj literatur-muzikaj numeroj. Popolaj kaj modernaj dancoj daŭris ĝis la 2-a matene. Granda morala kaj materiala sukceso!

— Ĉe la matensoleno en la Nacia teatro okaze de la jubileo de la konata beletristo T. G. Vlajkov, la BEA estis reprezentita de nia vicprezidanto s-ro Krestanov, kiu publike gratulis la jubileanton kaj partoprenis la bankedon.

— La Sporta klubo „Esperanto“ aliĝis al BEA per la Sofia esp. societo.

— Lastatempe ĉefurbaj esperantistoj kunvenas en laktejo „Temenuga“, ul. Rakovski, 16, sub bul. Dondukov.

Ferdinand. La 17. II. nia kunbatalanto R. Triĉkov paroladis pri esp., post kio okazis praktika lekcio forte impresinta la publikon. Lia filino Esperantina deklamis la versaĵon „Pendigo de Vasil Levski“. Kurso kun 50 p.

v. Golema Jelezna, Trojansko. Esp.

kurso, gvidata de s-ro Nejĉev.

v. Kableŝkovo, Pomorijsko. S-ro Zl. Zahariev, instruisto, fervore agas, gvidis kursojn kaj fondos societon.

✓ **Kirĝali.** Societo „Stelo“ prosperas. La kurso daŭras kun 15 p.

✓ **Pazarĝik.** Societo „Radio“ vigle agas dank' al sia laborema prezidanto Iv. Konstantinov. La 9. II. okazis grandioza esp. balo en la salonego de teatro „Videlina“. Bonega sukceso kaj entuziasmo.

✓ **Ruse.** Soc. „Espero“ elektis novan estraron: prez. Iv. Josifov, vicprez. Iv. Stanĉev, sekr. Dim. Ivanov, kas. P. Dimitrova, bibl. A. Slavov, kons. Iv. Grozev; rezerv.: Sijka Deĉeva kaj Mih. Karakaŝev; kontr. kom.: T. Ĉernev, Mih. Marinov kaj At. Djulgerov. S-ro Uzunov estis proklamita honora prez., kaj s-ro Josifov bonfara membro.

v. Sungulare, Karnobatsko. Kurso kun 10 p., gvidata de P. D. Miĥajlov.

✓ **Ŝumen.** Societo „Vekiĝo“ renovigis sian agadon. Nova komitato: prez. Ilija Silvestriev, vicprez. D-ro H. Tupuzov, sekr.-kas. Ilija Teodorov, bibl. D. Stojkov, kontr. kom. I. Jankov, E. Koeva, H. Reĝebov. La societo aranĝis 2-monatan kurson.

Kulturaj ligiloj inter Bulgarujo kaj Jugoslavio

Lastatempe estiĝis ĝojga movado inter la kulturaj agantoj de ambaŭ najbaraj landoj. „La funebranta familio“ de la jugoslava dramaŭtoro Branislav Nuŝiĉ estis la unua lumradio en la vintra mallumo, kiu kuŝis sur la najbarpopola animo. La prezentado de tiu teatraĵo en la Nacia Teatro Sofia puŝis ankaŭ la politikistojn al laboro pri la grava historia misio komisiita al ili. La Belgrada Teatro prezentis siavice la faman komedion „Golemanov“ de la bulgara dramaŭtoro St. L. Kostov.

Alia kultura proksimiĝo estas komunikata el Ljubljana: La Sofia ĥoro „Rodina“ donis tie koncerton de bulgaraj popolkantoj. La ĥorisioj estis tondre aplaŭditaj kaj superŝutitaj per floroj. La menciita ĥoro vizitis ankaŭ aliajn urbojn de la frata lando kaj ĉie rikoltis sukcesojn.

La studentoj ankaŭ partoprenas la aferon de la kunfratiĝo. Fine de Marto granda studenta grupo vizitis Belgrad, Ljubljana, Zagreb, Sarajevo, Dalmacion k. a. Fine de Aprilo jugoslava studentaro vizitis Bulgarujon. Proksima estas la dato, kiam en Sofia kaj Beldrad okazos ekspozicioj de bulgaraj kaj jugoslavaj libroj.

La kulturaj agantoj de ambaŭ landoj estas mobilizitaj. Ankaŭ la esperantistoj kontribuas al tiu ĝojiga fratiĝo. Eble en ne malproksima tempo la Balkanlanda esperantistaro sukcesos aranĝi universalan aŭ almenaŭ najbarlandan kongreson en la centro de la duoninsulo — Sofia. Ni esperu kaj laboru! I. H. K.

La Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio lastatempe tre vigliĝis. Oni ankoraŭ ne digestis la V-an aldonon al la Universala Vortaro, jen ĝi dissendis VI-an aldonon — navajn vortradikojn por oficialigo. Ni opinias, ke tiuj proponoj estas tro oftaj, la proponaĵoj ne nepre necesaj kaj la templimo por voĉdonado ne sufiĉa.

Ni samopinias kun nia itala kolego s-ro Orengo, ke jam devas okazi publika diskutado serioza pri ĉiu aparta vorto, por aŭdi ankaŭ la opinion de eventualaj kompetentuloj ekster la L. K. Ni devas esti tre atentaj pri novaj vortoj por ne dikigi senbezone la vortaron de la f a c i l a esperanto kaj ne endanĝerigi la tutan internacilingvan aferon.

Dume estas aliaj, pli gravaj aferoj por solvi: la subskribinto jam antaŭ 3 jaroj publike tuŝis la problemon pri la participaj formoj. Pravigante lian uzon de -ita anstataŭ -ata, kiun certe aprobus ankaŭ nia Majstro (kiu ĝuste laŭ la slava delikata sento por ĝusta uzo de participoj uzas en tiaj okazoj -ito: „delegito“, „kulpigito“, kvankam internacie pli konata estas „delegato“ ktp.), kelkaj slavaj kaj francaj kompetentuloj petis la akademion pridiskuti kaj solvi ĝin. Ni ree atentigas, ke la slavoj neniam pekas kontraŭ la gramatikaj reguloj, dum germanoj efektive transplantas sian nacismon en esperanton.

I. H. K.

† Niaj mortintoj

Rale C. Bojaĝiev el Koprivŝtica, malnova kaj gaja samideano, ĉeestinta la jubilean universalan kongreson en Kra-

kovo 1912, ekskomitatano de BES, mortis en Pernik, Bulgarujo.

Pacon al lia spirito kaj kondolencon al lia edzino!

Al germanaj samideanoj ofte ĝenantaj nin per presaĵoj ni afable respondas: ne fariĝu ridindaj — nenie ekzistas pura raso hodiaŭ, ĉio estas miksitaj! Tiu ĉi malmulto nun sufiĉu al inteligentuloj.

KIEL NI LABORAS (Respondo al anonimulo)

La redaktora ofico estas honora. La enspezoj de BEA estas tiom malgrandaj, ke eĉ la sekretario devus rezigni la pagon. Sed apenaŭ estas kredeble, ke troviĝus idealisto, kiu senpage plenumus ankaŭ ĉi laboron.

En kio do konsistas la redaktora laboro? — Apenaŭ iu kredus kiom ampleksa, tempoperdiga kaj okuldifekta ĝi estas. Jen: legado, korektado kaj ofte kopiado de manuskriptoj, legado de gazetoj, broŝuroj, libroj kaj elĉerpado de novaĵoj, verkado de artikoloj, kurado kaj serĉado de kliŝoj, finpretigado de materialo, ĝia aprobado de la „redakcia komitato“ kaj portado al la presejo, plurfoja korektado de la presprovaĵoj — unue laŭ kolonoj, poste laŭ paĝoj, fine revizio aparta kaj surmaŝina. Ĉar ofte preskaŭ en ĉiu vorto estas preseraroj — kaj dum unuj korektataj, aliaj estas farataj — necesus 5–6-foja legado de la sama afero, kaj la redaktoro ankaŭ estas homo kun du manoj kaj du okuloj! Finfine korespondado, skribado de adresoj kaj ekspedado de pruvekzempleroj al kunlaborantoj kaj librosendantoj, kelkafoje eĉ enkasigado de abonoj... Laboro neimagebla de vi, karaj gelegantoj, kiuj nur scias kritiki, sed ne helpi kaj faciligi.

Do, ĉu iu rajtus kulpigi la redaktoron, se li estus devigata forlasi sian „oficon“, post preskaŭ du-jara sindona senprofita kaj sendanka laboro!

Red.

Б. Е. е органъ на всички есперантисти въ България, а не само на „редакционния комитетъ“ и на нѣколко случайни негови сътрудници. Нека всѣки членъ-абонатъ вземе участие въ списването му, като прати интересни оригинални и преводни статии.

Ped.

XXII. BULGARA ESPERANTISTA KONGRESO, VARNA
21.-22.-23. DE JULIO 1935.

Sub protekto
de la distriktestro
s-ro Boris Kazanliev.

Bulteno

№ 1

Adreso :
XXII. bulgara
esperanto-kongreso

Karaj gesamideanoj,

Le loka kongresa komitato havas la grandan honoron kore inviti vin viziti kaj partopreni la XXII-an bulgaran esperantistan kongreson, kiu okazos en la bela urbo Varna — la reĝino de Nigra maro. Venonte ĉi tien, vi havos la feliĉon ĝui la plezurojn kaj ĉarmojn de nia pitoreska marbordo kaj urbo Varna. La kongreso okazos en la tempo, kiam la bansezono estos en sia plej granda agitiĝo, kaj vi havos la maloftan okazon pasigi plei feliĉe kaj agrable.

Sunbrilo
Ozono
Urbvivo
Banoj

Do, ni estas certaj, ke vi plej gaje
amuziĝos en la gesamideanara rondo, kaj
vi revenos kun neforgeseblaj rememoroj.

Teatroj
Ekskursoj
Naĝado
Dancado

PROGRAMO:

- Sabate, 20. julio. Renkontiĝo de la kongresanoj kaj la gastoj. Interkonatiĝa vespero.
- Dimanĉe, 21. julio. Solena malfermo de la kongreso antaŭtagmeze. Posttagmeze je 17.—20. h. trarigardo de la vidindaĵoj de la urbo.
- Lunde, 22. julio. Matene: Jarkunveno de B. E. A.
Posttagmeze: Ekskursoj al Alaĝa monaĥejo, Vladislav Varnenĉik, Asparuhov val k. a.
Vespere: Vivmaniera vespero.
- Marde, 23. julio. Matene: Daŭrigo de la kunsido.
Posttagmeze: Ekskursoj al reĝa palaco Eŭksinograd kaj „Lazura bordo“. Tie komuna vespemanĝo.

Kotizo: 30 levoj. Por fremdlandanoj — 1.50 sv. fr. aŭ egalvaloro. La kotizo ankaŭ pagebla per bulg. markoj. La aliĝintoj ricevos kongreskarton, rajtiganta viziton de la muzeoj, ekskursoj k. a.

Aliĝiloj: Dissendotoj al ĉiuj dezirantoj kaj societoj. Akceptataj nur ĝis la 15-a de julio.

Fakaj kunsidoj: Organizantoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn.

Loĝejoj: 20—80 levoj. Speciala komisio zorgos pri la loĝejoj.

Nutrado: 25—60 levoj por unu tago.

Kiu frue aliĝas, tiun plej koro dankas la kongresa komitato.

La loka kongresa komitato ankaŭ kore invitas ĉiujn fremdlandajn samideanojn. La kondiĉoj estas tre favoraj kaj la vivo estas malmultekosta.

La vizitantoj ricevos senpagan bulgaran vizon kaj rabaton sur la bulgaraj fervojoj.

Vidindaj lokoj, multaj ekskursoj.
Aliĝu senprokraste!

LOKOKO.

Международенъ езикъ е не само пренеобходимъ, а и възможенъ. Конгреситѣ и пресата на есперанто въ най-различнитѣ страни сж очевидно доказателство за това.

А. Мейе.

Есперангски новини

27-ият универсален конгресъ на есперанто, заедно съ 11-ия лѣтенъ университетъ и кръстосването на Срѣдиземно море, както съобщихме, ще стане на 3.-17. августъ т. г. Временната програма е извикала въодушевени похвални одобрения въ цѣла Европа. Организационниятъ комитетъ много усърдно и точно се грижи и за най-малкитъ подробности, така щото всички вкусове и предпочитания ще бждатъ задоволени. Съ общитъ усилия на всички съидейници можемъ да бждемъ сигурни, че успѣхътъ на 27-ия есп. конгресъ ще означи незабравима дата въ историята на човѣшкия напредѣкъ. Ректорътъ на Римския университетъ е благоволилъ да тури на разположението на конгресиститъ историчната палата на самия университетъ въ центъра на града до сената и парламента.

Поръчайте си веднага конгресна карта срещу 80 лири (560 лева) при: Esperanto-Centro Itala, galleria Vitt: Emanuele 92, Milano.

Заб. Италианската и югославянската легации въ София сж оведомени за безплатни визи и намаления при пътуването.

Б. Е. С. е направилъ необходимитъ постѣпки предъ италианската легация за групово пътуване до Римъ съ най-голѣми отстъпки и улеснения. Още отъ сега предупреждаваме, обаче, че отъ тѣхъ ще се ползватъ само членовѣтъ-абонати. Затова присѣдинете се веднага къмъ Б. Е. С., като пратите 40 лв. (64 лв. за София), за да получите членска карта и органа.

26-иятъ конгресъ на британскитъ есперантисти ще се състои отъ 7. до 11. юний т. г. въ Southend-on-sea. По тоя случай е издаденъ илюстриранъ есп. проспектъ за тоя красивъ приморски градъ.

VIII-иятъ конгресъ на югославскитъ есперантисти ще стане на 9-10. юний т. г. въ Осийекъ. Българскитъ съидейници се канятъ особно радушно. Конгресната карта струва 25 динари.

Бюрото за чужбинни сношения въ Горня Австрия устроява въ края

на юлий т. г. международно музикално праздненство въ честь на прочутия симфонистъ Антонъ Брукнеръ. По тоя случай ще има и излети до красивитъ околности най-вече на Залцкамергутъ. Есперантисти на пътъ за конгреса въ Римъ или за предконгреситъ въ Инсбрукъ и Клагенфуртъ ще бждатъ добре дошли. Подробности и програми на есп.: Oberösterreichisches Landes — Verkehrsamt, Linz, a. D., Aŭstrio.

Практичната стойность на есп. се вижда и отъ многобройнитъ търговски проспекти на тоя езикъ. Всесвѣтски известната износна къща Günther Wagner въ Hannover, Германия, е издала отново есп. проспектъ за мастила, бои и пр. Образци и цено-разписи при поискване.

Лионскиятъ панаиръ е издалъ нови красиви проспекти на есп. Вече 12 год. откакъ той е въвелъ, употребява и поддържа есп., на който ежегодно издава и голѣми афиши.

Парижскиятъ панаиръ е ималъ тоже удоволствието да констатира, че много отъ френскитъ и чуждестраннитъ му посетители и изложители сж употребявали есп. за сключване на сдѣлки. Близкиятъ ще стане отъ 18. май до 3. юний т. г. Издалъ е художествени проспекти и афиши на есп., които се пращатъ безплатно.

По случай 85-годишнината на чехословашкия председателъ Д-ръ Т. Г. Масарикъ, неутралниятъ есп. центъръ въ Прага е разпратилъ по цѣлия свѣтъ есп. статии и снимки за сжщия, съ молба да се преведатъ и помѣстятъ въ мѣстната преса.

Международенъ есп. курсъ за чиновници по ж. п., трамвайни и др. съобщителни срѣдства ще има на 2-12. май т. г. въ Esperanto-Domo, Arnhem, Nederlando. Ще се ръководи отъ познатия пасторъ Andreo Се, по директната метода, безъ учебници, безъ употреба на националенъ езикъ, безъ домашна работа, по практиченъ и забавителенъ начинъ. Вноска: 7.50 хол. гулдени, а за членове отъ сжщото семейство само 5 гулдени.

Въ Япония е започналъ да излиза новъ полумесеченъ илюстриранъ вестникъ „La Kosmo“. Пробенъ брой безплатно при: Japana Esp.-Asocio, Kudan 3-ŝome, Koĵimaĉi-ku, Tokio, Japanijo.

Китайската езикова книжарница въ Пейпинъ ни приятно изненадва. Почнала е издаването на „Есперанто-китайска библиотека“ и като първи номеръ на сжщата е издала 50-странична книжка на есп. и китайски паралелно: Вила край морето и На гробищата, разкази отъ Г. П. Стаматовъ, есп. преводъ на Ив. Х. Кръстановъ, китайски на Кинкемо. Въ предговора на китайски се говори за автора, за преводчика и за България, което долавяме отъ есперантските цитати. Като втори номеръ на библиотеката е оповестено Именското езеро отъ Теодоръ Щормъ.

Ето едно доста похвално дѣло на есперантиститъ за взаимно опознаване на народитъ. Ние сме особено поласкани и благодарни за вниманието,

дето нашата родна литература е зачетена въ Далечния Изтокъ.

Известия отъ Централния комитетъ.

При свързването на списанието Центр. к-тъ, въ отговоръ на постжп-китъ, които бѣ направилъ за отпускане валута, получи съобщение отъ Б. Н. Б., която иска да знае колко приблизително членове на съюза ще посетятъ международния конгресъ въ Римъ.

Умоляватъ се, всички ония членове на съюза, *напълно отчетени*, които възнамѣряватъ да посетятъ конгреса, да се обадятъ незабавно на съюза, за да се изпрати исканото сведение на банката.

Централниятъ комитетъ на Б.Е.С. съобщава, че на 5. май ще се състои южно-българска конференция въ Пловдивъ. Поканватъ се съидейницитъ да присѣтствуватъ. Пжтуване съ 70% намаление по случай панаира.

Подробности и дневниятъ редъ ще се съобщятъ съ специално окржжно.

Bibliografio

* La Morea per lo, de D. Simson, el la nederlanda lingvo tradukis R. Delpasko, Ideala Esp. Biblioteko, presejo „Helmond“ Esp. fako, Helmond, Nederlando, pĝ. 224, prezo 1.40 sv. fr.

Alloga eksteraĵo, bonega papero, bela preso, interesa enhavo: La riĉaĵo de Ameriko allogas; mizerulo Milton forlasas Nederlandon kaj revenas multmillionulo. Li daŭrigas la simplan vivon, tamen lia filo ĝuas ĉiujn plezurojn de l'nuna vivo, edziĝas kaj lia edzino devas blindigi la mondon. Ŝiaj juveloj estas mirindaj, sed iun tagon la plej granda el ili malaperas... Oni serĉas, arestas, murdas ktp. por trovi ĝin. La tre multaj preseraroj (pĝ. 88 intertempe, pĝ. 89 bruon, mallaŭte, pĝ. 124 lie (?), pĝ. 159 kaj) tute ne ĝenas. Impresas la tre malalta prezo de tiu ampleksa kaj preskaŭ luksa eldonaĵo.

* Vilao apud la maro kaj En la tombejo de G. P. Stamatov, esperantigis Ivan H. Krestanov, ĉina traduko de Kinkemo, Biblioteko Esperanto-Ĉina № 1, Ĉina mondlingva librejo, 15

Shang Sieh Chiaï, Peiping, Ĉinujo, 50 paĝoj, prezo 0.40 sv. fr. aŭ egalvaloro en alia valuto.

En la ĉinlingva antaŭparolo de tiu bela dulingva libreto estas parolate pri Internacia Mondliteraturo, Nuntempaj Rakontoj, G. P. Stamatov, Ivan H. Krestanov kaj liaj esp. verkoj pri Bulgarujo, kion ni komprenas al la tie cititaj esp. nomoj.

Jen agrabla surprizo kaj dankinda faro, kiun kronikis ĉiuj ĉefurbaj taggazetoj. Ni estas tre flatitaj kaj kontentaj de la atento de niaj ĉinaj (ni preferus la Zamenhof'an ĥinaj) amikoj pri nia literaturo. La malproksima Oriento ŝajne pli bone komprenas kaj ŝatas nin. Ni varme rekomendas la libreton al ĉiuj.

* Kursi Esperanto, de D-r Szilágyi, eld. Soc. Esperanto, Stockholm, 1935, pĝ. 96, prezo 2 sved. kr.

* Al Toronto, de Stellan Engholm, II-a eldono, Eld. Soc. Esperanto, ockholm, 1934, pĝ. 93, prezo 1.20 sved. kr.

* Sveda Antologio, I-a parto. sub redakto de Sam. Jansson, Eld. Soc.

ОКРЪЖНО № 261 5. IV. 35.

Драги съидейници,

Централният комитет на Българския есперантски съюз съ с удоволствие съобщава, че известният куплетистъ-хумористъ Стоянъ Миленковъ, нашъ добъръ съидейникъ и съюзеиъ членъ, въ желанието си да подпомогне споредъ силитъ и възможността си материално и морално съюза и съюзнитъ д-ва, пожела да даде 10⁰/₀ отъ чистия приходъ отъ спектаклитъ си за въ полза на съюза.

Централният комитетъ, като изказва благодарността си на съидейника Ст. Миленковъ, същевременно моли ръководителитъ на съюзнитъ д-ва, както и отдълнитъ организирани есперантисти да му оказватъ пълното си съдействие и подкрепа.

Отъ чистия приходъ на спектаклитъ ще се удържа 10⁰/₀, като 5⁰/₀ остане за въ полза на мѣстното д-во, а 5⁰/₀ се изпраща въ съюза.

Председателъ: П. Йордановъ

Секретарь: Б. Октомврийски

Esperanto, Stockholm 1935, paĝoj 432, broŝ. 8.50 sved. kr.

Unu el la plej grandaj taskoj de Esp. estas prezenti al la tutmondo la kultur-trezorojn de la malgrandaj nacioj, kiuj sen Esp. restas kaŝitaj pro la fakto, ke iliaj lingvoj estas preskaŭ nekonataj ekster la landlimoj.

Post la bulgaroj, belgoj, hungaroj, estonoj kaj katalunoj, nun la svedoj pliriĉigis la esp. literaturon per grandioza verko. En la prezentita parto aperis elektitaj prozaĵoj kaj poeziaĵoj de aŭtoroj famiĝintaj inter 1880 — 1920. Traduko, preso kaj papero estas unuaklasaj. La esperantistaro ŝuldas multon da dankoj al ĉiuj kunlaborintoj de tiu ĉi vere altvalora verko, kiun ni varmege rekomendas.

* Paris dum printempo, 8-paĝa ilustrita prospekto, senpage ricevebla ĉe: Foiro de Paris, 28 rue N. D.-des-Victoires, Paris 2-e, Francujo.

* Internacia lernolibro por esp-istoj de Heinz Jacob, 32 paĝoj.

* Esperantoldo vortaro de Heinz Jacob, 67 paĝoj, Eld. Germanaldo Asocio, Berlin-Charlottenburg 9, Germ.

* Съчиненията на Т. Г. Влайковъ (verkaro de Т. Г. Vlajkov, en 6 volumoj: rakontoj kaj noveloj, skizoj kaj kronikoj, artikoloj kaj notoj pri soci-klerigaj demandoj, pri la politika vivo ĉe ni, pri la kooperativaj kaj agrikulturaj problemoj k. s., entute 2,650 paĝoj, pre-

zo 660 levoj. Krome de la sama:

Чиновничество и властници (Oficisteco kaj regantoj, skizoj, pĝ. 348, prezo 50 levoj, Sofia 1934.

Завои (Vojkurbiĝoj), pĝ 112, prezo 30 levoj, Sofia 1935. Eldono de l'aŭtoro.

Преживѣното (Травивајој), parto I — Infanaĵoj, pĝ. 336, prezo 60 levoj, Sofia 1935. Eldono de la Ministerio de publika instruado.

* Учебникъ по българска народна стенография (Lernolibro de bulgara nacia stenografio), de D. Antonov, estro de la stenografa fakocĉe la Parlamento, Sofia 1935, pĝ. 48, prezo 30 levoj.

La sistemo estas laŭ la Gabelberger, sed tiel simpligita, ke la stenografio fariĝas de ĉiuj facile akirebla. Per sia nova metodo la aŭtoro atingis mirindajn rezultojn eĉ ĉe infanoj. Ni varme rekomendas ĝin.

* Синтетична метода по френски (Méthode synthétique de français), de Blagoj Mavrov Sofia 1935, II-a eldono, 10 lukse binditaj lidroj por 300 levoj.

Tiu ĉi nova metodo ricevis jam rekonon de multaj bulgaraj kaj fremdaj profesoroj. Ĝi malkovras laŭ originala, akirebla kaj praktika vojo la plej subtilajn gramatikajn regulojn. Trafaj ekzemploj, desegnoj kaj idealaj respondoj

faciligas kaj akcelas la ellernon. Ni varme rekomendas ĝin al ĉiuj lernemuloj.

* Influences étrangères dans la littérature bulgare, première partie, par Nicolaï Dontchev, 150 paĝoj, prezo 60 levoj. Red. de „La Bulgarie“, Sofia 1934.

* Основни и второстепенни въпроси изъ новобългарската граматика, отъ проф. д-ръ Ст. Младеновъ, София 1934, стр. 98, отдѣленъ отпечатъкъ отъ списание на Бълг. Академия на Наукитъ, кн. XLVIII.

* Къмъ светилицето на мисълта, философски четива за младежи отъ Б. Радушевъ, стр. 80, цена 20 лв., доставя издателство Любомиръ Чилингировъ, бул. „Кн. Карлъ Шведски“, 47, София.

* Противъ чуждитъ училища, отъ Сг. Чилингировъ стр. 100, цена 20 лв., сжщото издателство. Горещо препоръчваме тая навременна книга.

* Поща и Пожаръ, илюстровани стихове за деца, отъ С. Маршакъ, побългарилъ Хр. Радевски, по 10 лв.,

сжщото издателство.

* Беседи за детски православни християнски дружества при първоначалнитъ училища, отъ Борисъ Мариновъ, ул. Ведрина 3, София, две полугодия, 352 стр., цена 37 лв.

* Старчето се жени, комедия въ 4 действия, отъ М. Ланговъ, стр. 38, цена 10 лв., Дупница 1935.

* Възпитанието въ свѣтлината на националния идеалъ, отъ Хр. Стояновъ, съ предговоръ отъ проф. Д-ръ Ст. Консуловъ, стр. 96, цена 30 лв., София 1935.

* Ръководство по пощенската чекова служба, отъ Г. Дочевъ, стр. 164, цена 50 лв. София.

* Институтътъ на П. Т. Т. Р. и неговото устройство въ България, отъ Василь Ив. Илиевъ, н-къ на пощ. чек. бюро, София, 1934, стр. 88, цена 55 лв. За тоя си цененъ професионаленъ трудъ нашиятъ съидейникъ е използувалъ и есперантска литература. Изданието му въ едно кжсо време е изчерпано.

I. H. K

Български есперантски съюзъ доставя следнитъ издания:

1. Възможенъ и нуженъ ли е междун. пом. ез. отъ д-ръ Ив. Д. Шишмановъ	4 лв
2. Есперанто отъ д-ръ Ив. Д. Шишмановъ	2 "
3. Есперантски синтаксисъ отъ Зах. Зихариевъ	22 "
4. Есперанто ще завладѣе свѣта отъ д-ръ Д. Гаврийски	12 "
5. За международния езикъ (анкета), съставилъ Ив. Х. Кръстановъ	5 "
6. Есп. бълг. и българо-есп. речникъ съ осн. граматика, III-о изд. Ив. Х. Кр.	75 "
7. Bulgara Antologio, bukedo de 40 geverkistoj kun fotoj, Кръстановъ	75 "
8. La Bulgara lando kaj popolo, kun trikolora etnogr. landkarto, Ив. Х. Кр.	100 "
9. Albumo de bulgaraj geesperantistoj, съставилъ Б. Октомврийски	30 "
10. Esperanto-korelativoj, съставилъ Рад. К. Тричковъ	5 "
11. 3-та конгресна речъ на д-ръ Л. Л. Заменхофъ	2 "
12. 4-та и 5-та конгресни речи	2 "
13. Практична граматика на международния езикъ Есперанто	3 "
14. Международната конференция за общъ търговски езикъ въ Венеция	5 "
15. Есперанто-български разговорникъ	5 "
16. Портрети на д-ръ Л. Л. Заменхофъ (голямъ форматъ)	15 "
17. Картички	3 "
18. La espero (есперантскиятъ химнъ — текстъ и ноти)	3 "

Поръчкитъ се изпълняватъ въ предплата.

Сумитъ превеждайте чрезъ пощ. чекова смѣтка 1133.

Адресъ: Бълг. есперантски съюзъ, пощ. кутия № 233, София.